

HES

JUNULARA SEKCIO - HISPANA ESPERANTO FEDERACIO

REDAKTORINO:
F-INO CARMEN NAVARRO

Nro. 72 - 1971

Str. Barrencalle Barrena, 7 - 1.^a
Telefono 24 44 92 - BILBAO-5



**Salutoj de MARI TRINI
por la junaj geesperantistoj.**



000000

En la jena bulteno vi povas legi:

Kion devas alporti la junularo	...	1-2
Homo	...	3
Plezuro	...	4
Vivu la virinrajtoj k.t.p.	...	5-6-7
Juneco	...	8
Esperanta kulturo	...	9
Malfermo de la kurso	...	10
Nova estraro de T.E.J.O.	...	12
Humora angulo	...	11
Loterio	...	12
Atentu !	...	10

KION DEVAS ALPORTI LA JUNULARO ?

Ni, la gejunuloj, devas ion alporti por nia movado. Ĉie en la mondo, kaj nun kun plia intensigo, la junularo faris, aŭ partoprenis grandparte, la ŝanĝojn.

Lastatempre tra la mondo sentis novan junularan venton, kaj ankŭ esperantistaj gejunuloj ribelis okaze de la 25-a Internacia Junulara Kongreso de T.E.J.O. en Tyresö. Dum tiu historia evento, por ni, montris ke ankŭ ni estas sur la sama vojo, ĉar esperantistoj kaj junularo celas samajn atingojn.

Sed ne estas mia deziro rememori la jam konatan Deklaracion de Tyresö, nu, ni kiuj kunlaboras por la plej bona estonteco de H.E.J.S. estas la ŝlosilo por la estonteco de nia enlanda Federacio kaj la sablero de la tuta poresperanta movado mondscale, ĉar ni devas ne forgesi ke Esperanto estas ne nacia sed tutmonda lingvo, do ni ankŭ devas atenti pri la internaciaj junularaj organizaĵoj kiuj prizorgas mondskalajn kampanjojn favore al la Internacia Lingvo.

H O M O —

Homo rigardis
sed nenium vidis li

Homo aŭskultis
sed nenion aŭdis li

Homo piediris
sed nenien alvenis li

Homo serĉante ion estis
sed ion ne trovis li.

Finfine, homo malfermis lian kruston, forflugante de ĝi kvazaŭ fulmo trapasas la ĉielon en aŭtuna ŝtorma-tago. Venteto, karese, puŝis lin ĉiam antaŭen, senhalte, libere.

Subite kirlo da dolĉaj sonoj eniris en lian koron superflugante tute lia estaĵo, torporante liajn sentojn kaj arĝentlumaj steloj ĉirkaŭis lin eskortante lian eternan vojaĝon.

Ĉu trankvileco...? Ĉu paco ...? .

Ĉu ripozo por ĉiam...? Ĉu feliĉo...?..

PLEZURO

Kiam mi aŭskultis telefone ke tiu, kiu antaŭ du semajnoj forlasis mian hejmon, jam alvenis, mi, tre emociata ne sciis ĉu preni aŭtobuson aŭ taksion por alveni hejmen frue. De antaŭ du semajnoj, mi volis fari tion kion mi kutimas fari ĉiutage.

Finfine mi prenis taksion pensante ke vere, estas tre malfacile ŝanĝi la kutimon kiun oni havas de jaroj.


Alvenante, mi volis preni la lifton sed ĝi estis okupita, do mi rapide supreniris la ŝtuparon ĝis la sepa etaĝo, kie mi loĝas... Ah! mi estis tre laca kaj mi scias ke fari tion, kiam oni estas laca, estas tre malsana... Tamen, mi komencis senvestigi min. Samtempe mi kantis ĉar mi estis tre feliĉa. Finfine mi farus tion!. Dum du semajnoj mi ne faris ĝin!. Mi finis senvestigi min kaj mi prenis la sapon, la toalon kaj la kolonon ĉar mi kutimas uzi ilin kiam mi faras tion.

Mi estis preta sed subite mi aŭskultis voĉon dirante ke mi devas atendi ĝis kiam la posedanto de tiu voĉo finu. Oh! Mi estis preskaŭ freneza, ĉar, se mi ne povas esti la unika persono kiu faras tion, almenaŭ mi volas esti la unua!.

En mia ĉambro mi atendis malgaja kaj maltrankvila ĝis kiam la alia finis, tiam mi prenis miajn aĵojn, kaj mi iris tien. Mi fermis la pordon kaj mi kuŝis en la varma loko longe, kaj mi komencis bani min...!

Finfine la akvo alvenis ĝia mia etaĝo kaj mi povis bani min...!

Kia plezuro.....!



NAZHO

V I V U L A V I R I N R A J T O J ! !

V I V U L A M O D E R N A V I R I N O ! !

V I V U L A V I R I N O K A J L A


F U T B A L O ! ! . Estis unu el tiuj printempaj dimanĉoj. La ĉielo estis sennuba, la suno kareseme briladis kaj ĉio invitis min al promenado, almenaŭ al promenado tra la urbo. Malgraŭ la favoraj kondiĉoj veteraj kaj atmosferaj antaŭe menciitaj, mi estis devigata resti hejme kun miaj tri infanoj, kiuj estis 6-4-kaj du jaraĝaj. Miaj infanoj, en mia opinio, bone edukitaj, ne donis al mi tro da zorgoj, nur la malgranda per averto de mia nazo, okupigis min en tasko ne tre rekomendinda.

Komprenoble mi estas edziĝinta, sed pro neevitabla kompromiso de mia edzino ŝi resti for de la hejmo. Felice por mi malfelice por la infanoj. Por pasigi, kiel eble plej bone mian "vidvan" posttagmezon mi havis la modernan ideon, funkciigi la radioricevilon kaj jen kion oni elsendis en tiu ĝusta momento.

....sur la ludtereno envicigitaj troviĝas ĉi tiuj belaj virinoj, fraŭlinoj, kiuj hodiaŭ ludos la futbalmatĉon kiu decidos la teamon kiu fariĝos la ĉampiono de la nuna jaro.

La radioparolisto citas la nomojn de la futbalistinoj de ambaŭ teamoj, kaj li daŭrigas... ĉi tiu piedpilka matĉo montras al ni ke finfine la virino atingis la rajtojn, kiujn ŝi meritas en la socio kaj inkluzive en la sportoj, sed karaj geaŭskultantoj- li avertas- la matĉo komenciĝas, la arbitraciisto sonorigis la fajfilon kaj la ludo komenciĝis.....

La radiokomentariisto senĉese parolas, parolado kiun tute mi ne povas rakontial vi, ĉar ĝi fariĝos libro pli dika ol la Kinoto. Tamen specialan intereson mi havis kiam li rakontis la ludaĵojn de la futballudantino Maria.jes, sinjorinoj kaj sinjoroj- parolas la matĉokomentariisto- la brava Maria antaŭen iras, lerte ŝi evitas la kontraŭlinojn, kiuj ne kapablas deviigi la pilkon, kiun Maria lerte antaŭen puŝas piede... Maria cedas la pilkon al sia kamaradino Rozo, ĉi tiu ĝin sendas de nove al Maria kaj Maria iras antaŭen, avancas.. karaj radioaŭskultantoj io neimagebla, kia ludaĵo!! , nerakontebla... dangere Maria alproksimiĝas al la golejo de la kontraŭa teamo, Maria pretas sin je forta piedpuŝon ĵeti la pilkon en la golejon, sed ŝi falas teren, ŝi starigas, sed.....



las denove, rapide ŝi restariĝas sed intertempe kontraŭlino piede puŝas la pilkon for de tiu danĝera zono de sia teamo, kaj la pilko falas al la piedoj de Jozefino, kiu estas kamaradino de Maria, Jozefino antaŭen iras kaj metas la pilkon antaŭ Rozo, kiu ŝia vice cedas ĝin al Maria, ĉi tiu rapide, rapidege avancas, ŝi evitas du kontraŭlinojn, ŝi prepariĝas por piede ĵeti la pilkon, kaj goolon!!! goolon de Maria


Io mirinda karaj geaŭskultantoj. Maria estas kisa ta, gratulata de siaj kamaradinoj, io eksterordinara, gesinjoroj.

Venas la masaĝisto -informas la komentariisto- ĉar laŭŝajne Maria estas vundita, kvankam ne grave sur la vango, li tre kareseme premfrotas la vangon de Maria, li verŝas sur la vundon la "miraklan akvon" kaj Maria denove estas preta por la ludado.

Ni jam troviĝas en la dua duono de la matĉo kaj jen kion rakontas la radioparolisto :
.....nu, Maria atingas la pilkon, la belega, ĉar krom eksteordinara futballudantino ŝi estas svelta kaj kapturiga virino, sed ni atentu al la ludo -li aldonas- kiel en aliaj okazoj Maria kombinas la ludaĵon kun sia kamaradino Rozo, kiu siavice kape puŝas la pilkon al Maria, Maria denove iras antaŭen, antaŭ ŝi troviĝas du defendantinoj de la kontraŭa teamo, kia kuraĝo!! kia kuraĝo!! gesinjoroj- daŭrigas la radiokomentariisto- ŝi intencas trapasi inter ambaŭ defendantinoj kaj piede puŝata Maria falas teren kaj sur ŝin la puŝantinoj, post tio alproksimiĝas la arbitraciisto kaj ordonas la plej grandan punon, per kiu Jozefino atingas la golon numero tri.

Sed karaj geaŭskultantoj, Maria restas kuŝanta sur la tero, venas la masaĝisto li intencas levi Marian sed ŝi ne povas, laŭŝajne pro granda piedbato, kiun ŝi ricevis sur la femuro de la dekstra kruro. La brava masaĝisto masaĝas, premfrotadas la femuron de Maria, kiu faras gestojn de doloro, oni provas levi Marian, sed vane, Maria indikas per sia dekstra mano, ke estas la alia kruro kiu dolorigas ŝin. La masaĝisto daŭrigas kun delikateco la kuracadon de la kruroj de Maria kaj la publiko malpacienças por scii kio okazis al sia heroino.

Sinjorinoj kaj sinjoroj -anoncas la matĉkomenta-




riisto- feliĉe Maria leviĝas, staras kaj lamente kuretas. Tondran aplaudadon ricevas la brava kaj belaspekta Maria, kies ludkapablo estos ekde nun ne tiel efika kiel antaŭe. La matĉo alvenis je la fino kaj jen kion rakontis la matĉkomentariisto:

.....kaj en ĉi tiu momento la arbitraciisto anoncas la finon de ĉi tiu futbalmatĉo, kiu eniros en la antologion de la piedpilka sporto. Sed karaj gesinjoroj, niloj da personoj inundas la ludterenon, ĉiu volas saluti, tuŝi, karesi Marian, karaj geamikoj- daŭrigas la komentariisto- estos io nerakontebla, tio kio okazas ĉirkaŭ Maria, nepre devas interveni kelkaj policistoj por ŝirmi Marian de la entuziasmo de ŝiaj geamikoj, el la korpo de Maria malaperis, dispecigita la ĉenizeto, ĉiu deziras havi rememoraĵon de ĉi tiu historia matĉo, de tiu heroino, kiu hodiaŭ brave montris la kapablon de la virino en la sportoj. Finfine Maria tra iras la koridoron por atingi kvazaŭ en bankostumon, tiel estis la entuziasmo de ŝiaj partianoj.

Momente oni haltigas la informadon pri la matĉo, oni reklamas pri diversaj manĝaĵoj kaj sapaĵoj kaj de nove revenas la voĉo de la matĉkomentariisto, jen kion li diras:.....en la plej granda aplaudado kiu jam estus dezirintaj por si mem la famaj Kubala, Di Stefano Gento k.t.p. la bravulino de la matĉo supreniras kiel kapitanino kiu ŝi estas la podion.....jes, jes la emociiga momento alvenas, Maria ricevas de la S-ro Prezidanto la belan kaj valoran kopalon, Maria dankeme kisas la Prezidanton kiu siavice tre ĝentile reciprokas al Maria.

En ĉi tiu momento ronke anoncas la radioparolisto -sinjorinoj kaj sinjoroj -mi devas sciigi gravan novaĵon, kiun ĝuste oni informas al mi -Maria estas edziĝinta kaj patrino de tri belaj infanoj. Kio donas al ŝi multe pli da merito kaj -li aldonas-, unu el la plej gravaj momentoj de la historio por la defendo de la virino ni ĝuste travivis, ŝi ne plu estos diskriminacigota. Ŝi ne plu estos tiu estaĵo kiu nepre devis resti hejne, ŝi ne plu estos la sklavino de la viro, la ekzemplo de Maria montras al ceteraj virinoj la sekvidan vojon, la virino fine, atingas tiun postenon kiun ŝi meritas, la diraĵo" - virino al la kuirejo" ne plu valoras.



Mi ne scias kion longe la radiokomentariisto daŭrigis sian paroladon laŭdante la virinon kaj ŝi - ajn rajtojn, ĉar mia eta infano per odoro, kiun flaris mia nazo, avertis min ke mi devas okupiĝi pri tasko ne tre rekomendinda. Do, mi silentigis la radioricevilon.

Jes, vi bone supozis Maria estis mia edzino.

LUIS SERRANO PEREZ
(SABADELL)

o-o

J U N E C O


Junaj koroj, kiuj forte batas.
Superpotenca pasio en la brulanta sango.
Milda haŭto, sorĉa kaj mistera nokto.
Obstina, ama pasio de la junaj amantoj.

Kanto de nokta birdo
odoro de freŝa herbo
velkintaj folioj
sopiraj, murmuroj, vortoj...

Mistera luno ĥimera,
Luno trenante fajrajn pensojn
Kiuj en la hela nokto disiĝas.
Vi, rivereto, muziko kiam vi forpasas
altaj pinoj, ĉu vi diras nenion?

Vi gardas sub viaj brakoj
la amon de la nokto klara
Vortoj, revoj, juneco, netrankvileco..
sopiroj....murmuroj...

JOZEFO



Estas evidenta fakto, la neceso ampleksigi kul-
turon en la tereno de esperanto sur-baze de adekvā-
ta kaj profunda studado fare de nia gejunularo, ki-
es personeco kaj respondeco konsistigos sendube la
fundamenton, ne nur de HEJS, sed ankaŭ de nia in-
ternacia movado. Tiu manko en la scipovo de nia ka-
ra lingvo aperas tre klara en niaj grupoj esperan-
tistaj.

Kompreneble tia konstato kaŭzas en nia animo
veran skeptikismon. Pro tio, ni volas klarigi iome
te la kialon de la menciita kulturmanko. Sed antaŭ
fari tion, estu permesita al ni diri la jenon :

Ni ne volas kritiki pedagogiajn metodojn, nek
ofendi la gvidantojn de kursojn, kiuj meritas nian
respekton; male, mia intenco estas nur montri kel-
kajn erarojn en la lernigado de la internacia lin-
gvo, kun la celo iom orienti la samideanojn kaj la
interesotojn.

Ni studos la problemon laŭ tri aspektoj aŭ el
tri flankoj, nome :

- 1) Ĉeesto al la esperantaj kursoj .
- 2) Opinio de pluraj samideanoj rilate la fe-
cilecon de Esperanto.
- 3) Opinio pri la akceptado de la Zamenhofa
lingvo.

(daŭrigota)

JAIME ARAGAY PUJOLS



MALFERMO DE LA KURSO

Ci tiu monato en preskaŭ ĉiuj hispanaj esperantistaj grupoj komenciĝis la nova esperantista kurso.

En la Bilbaoa Grupo nia eksprezidanto S-ro. J. Juanes eksplikis majstran inaŭguran lecionon, post mallonga elementa eksplikado de la esperantaj fundamentoj kaj kompari ĝin en ĝia simpleco kun la aliaj lingvoj, li parolis pri la disvolvado de la venonta kurso ĉar ĝi estos eksperimenta kurso : ĝi estos eksplikata de du junaj geinstruistoj kune. Ili estos S-ro. Fariñas kaj F-ino. Morán, prezidanto kaj sekretariino de HEJS respektive.

Ni deziras por ili la plej grandan sukceson.

Ni rimarkis pri la malabunda ĉeestaro de novaj gelernantoj, aldonu al ĉi tiu rimarko la aserton de iu samideanino kiu diris ke ŝi faras la 2500^a por lerni anglan lingvon en la lingva lernejo..... Kion ni povas pensi ?.

En diversaj naciaj kongresoj ni aŭskultis la proponon ke la esperanto estu samvalorigita kun la aliaj lingvoj per la Ministerio de Edukado kaj Scienco en la mezaj kaj superaj studadoj.

Kion oni povos diri al ni pri tiu-ĉi afero ?.
Kion oni faras pri ĝi? Ĉu ni povos helpi ?.

GABRIEL

= = = = =

ATENTON NI PETAS !!!

En la arkivo de HEJS mankas al ni kelkaj ekzempleroj de nia revuo. Se vi havas ripetitajn de tiuj numeroj kiujn ni citas sube, ĉu vi estus tiel afabla sendi ilin al ni?. Ni antaŭdankas.

Jen la numeroj kiuj mankas: De la numero 1 ĝis la n^o23 (ambaŭ inkluzive) kaj numeroj: 26-27-28-29-31-36-41-42-43-44-46-47-48-49-50-51-56-kaj 65.

Dankon denove!!

LA ESTRARO

NOVA ESTRARO DE T.E.J.O.

Dum la lasta I.J.K. okazinta en Edimburgo estis elektitaj kaj reelektitaj kelkaj personoj por la estraro de T.E.J.O. (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) al kiuj ni gratulas kaj deziras bonan sukceson !.

Jen iliaj nomoj :

Prezidanto : Dro. Renato Corsetti (Italio)
Generala Sekretario: D-ino. Flora Szabó (Hungario)
Kasisto: S-ino. Ulla Lujn (Svedio)
Vicprezidantoj: Dro. Hans Eichhrn (Berlin G.D.R)
F-ino. Jeanne Marie Liouville (Nederlando)
D-ro. Hans-Michael Maitzen (Germanio. FR)
Viksekretario: Guy Matte (Kanado)
Membroj: Win Janssen (Nederlando)
Ziverad Jevtic (Jugoslavio)
Marek Lassak (Pollando)
Claude Nourmont (Francio)

=====

L O T E R I O

Parolante dum la kongreso en Alicante pri la malaltaj financoj de HEJS, iu samideano sugestis al ni, ideon por plialtigi ilin.

Tiu ideo konsistas vendi loterion por la eksterordinara kristnaska lotumado.

Ni opiniis ke efektive ĝi estus tre interesa kaj pro tio ni danke akceptis tiun sugeston.

Tial ni deziras sciigi al vi ke ni havas loterion je la n^o 49.452 kies kosto estas 50 ptoj. plus 20% (t.e. 60 ptoj.) po unu kvitanco.

Do, ĉiuj interesatoj povas jam de nun mendi kiom ili volas. Limdato por mendi estos la 10^a de decembro, do, post tiu dato ni ne plu akceptos mendojn. Sed ni estos kore dankemaj se vi mendas kiel eble plej baldaŭ.

Ĉiuj mendoj faru al F-ino. MARIA GALVEZ

Pedro Astigarraga, n^o 2- 320

BILBAO-14

sendinte la monon per poŝtmandato.

LA ESTRARO